

ĈEA-Retkomunikoj 2013/02



ĈEA-Retkomunikoj estas neregula informilo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio sendata al ĉiuj rete atingeblaj membroj de ĈEA kaj ankaŭ al nemembroj, kiuj per ajna maniero montris intereson pri la Esperanto-movado en Ĉeĥio. Ĝi neniam enhavas aldoniĵojn. Se vi tamen ne volas ricevadi ĝin, sufiĉas respondi per simpla "ne sendadu" kaj ni tuj eligos vin de la dissendolisto.

Enhavo:

- [1. VORTOJ DE LA ĈEFREDAKTORO](#)
- [2. RETKOMUNIKOJ EN PDF-FORMATO](#)
- [3. MUZEA NOKTO EN SVITAVY 2013](#)
- [4. NOVAJ ZEOJ EN LIPNICE](#)
- [5. VENU KUNE FESTI 55-JARIĜON DE SOMERA ESPERANTO-TENDARO EN LA GOLFO DE LANĈOV!](#)
- [6. VIRTUALA ADRESO @ESPERANTO.CZ](#)
- [7. AKTUALAĴOJ EN WWW.ESPERANTO.CZ](#)
- [8. PLUAJ NOVAĴOJ EN LA MUZEA PAĜO ĈE IPERNITY](#)
- [9. RADIOPROGRAMOJ EN LA RETEJO DE "ESPERANTA RETRADIO"](#)
- [10. VIDEOJ NE NUR DE GERMANA ESPERANTA KONGRESO 2013 EN NUREMBERGO](#)
- [11. LISTO DE ARANĜOJ](#)

1. VORTOJ DE LA ĈEFREDAKTORO

Jen la dua numero de ĈEA-retkomunikoj en jaro 2013. Ĉi tiun numeron mi komencis skribi en trajno dum mia maja semajnfina esperanta vojaĝo al Vroclavo, kie hodiaŭ estas vigla grupo de junuloj gvidata de Konstatin Tiĥomirov (nuntempa vicprezidanto de PEJ) kaj Anna Maria Koniec-Polska Bień (nuntempa prezidanto de PEJ). Kaj miaj spertoj de la semajnfino? Nur pozitivaj! Venu mem al la urbo konatiĝi kun tiu ĉi freŝa pola esperanto vento, vi certe amuziĝos. Ankaŭ la urbo kompreneble vizitindas – en urbo estas multaj interesaj lokoj (multaj pontoj, insuloj kaj ankaŭ gnomoj...) Tamen, se por vi Vroclavo estas malproksime, venu almenaŭ por semajnfino al Svitavy por Muzea nokto 2013. Detalojn pri la aranĝo vi trovos en tiu ĉi numero. Do, aĝrablan legadon!



Redaktoro Miroslav Hruška

PS: Ŝparu la naturon - se eblas - ne printu tiun ĉi numeron de ĈEA-retkomunikoj, se ne nepre necesas. Estu amiko kun la naturo!

2. RETKOMUNIKOJ EN PDF-FORMATO

Kiel tradicie, ankaŭ tiu ĉi numero de ĈEA-Retkomunikoj en PDF-formato elŝuteblas [ĉi tie](#).

Arkivo de Retkomunikoj troveblas [ĉi tie](#).

3. MUZEA NOKTO EN SVITAVY 2013

Ni invitas vin al inaŭguro de la nova, ĉi-foje internacia ekspozicio "Esperanto kaj muzoj", ekde la 14-a horo kun bunta akompana kultura programo. Atendas vin prezento de diversĝenraj artistoj kaj artmetiistoj amatoraj kaj profesiaj el Ĉeĥio kaj eksterlando (Francio, Britio, Rumanio, Koreio, Brazilo k.a.) kaj bela muziko de komponistoj-esperantistoj. El inter ĉeĥoj prezentiĝos i.a. P. Rak, A. Vyšínková, M. Tomečková, S. Krajíček, M. Kráčmarová, P. Chrdle, M. Kosnarová k.a. Krome atendas vin tema programo pri ABELBREDADO en la Urba Muzeo kaj vespera renkontiĝo kun d-ro Zamenhof antaŭ 100 jaroj (en prezento de Jan Fidel Řepa). Detalan programon vi trovas sur [tiu ĉi paĝo](http://tiu.ĉi.paĝo). Pliajn informojn petu ĉe svitavy@esperanto.cz.



Karel Bartošík



Ho Song, Jižní Korea

Constantin Barjoveanu,
Rumunsko

Felix Moscheles, Velká Británie



Věroslav Bergs



José Leite de Oliveira Jr., Brazilie



Stanislav Krajčů



Anna Vyšínková



Pavel Rak

a další umělci z tuzemska a zahraničí
- OBRAZY - TRADIČNÍ ŘEMESLA - ŠPERKY

Trajnoj el ĉiuj direktoj venas al Svitavy ĉirkaŭ tagmezo. Kiel plej malmultekoste veni al Svitavy, vi povas legi en tiu [ĉi ĉeĥlingva artikolo](#).

Ni antaŭĝojas vian abundan partoprenon, kredante, ke vi ne enuos!



4. NOVAJ ZEOJ EN LIPNICE

Ekde 27.4.2013 ĉe vojkruciĝo inter Lipnice nad Sázavou kaj Dolní Město staras impona Statuo de Kapo XXII kun citaĵo el Ŝvejk en 10 lingvoj, inkluzive Esperanton. Krome rekte en Lipnice nad Sázavou, vid-al-vide al la municipa oficejo, estis tiutage plantita Esperanto-kaŝtano kun tabuleto (dediĉo al verkisto Jaroslav Hašek nome de ĈEA). En la loka Muzeo de J. Hašek vi povas nun vidi inter diverslingvaj tradukoj de Ŝvejk ankaŭ la esperantlingvan (ĉiĉerona teksto en Esperanto estas preparata). Fotogalerio de la aprila aranĝo troviĝas en [tiu ĉi paĝo](http://tiu.ĉi.paĝo). Pli detala raporto pri la aranĝo sekvas en Starto kaj en www.esperanto.cz.

Vojaĝante tra Bohemia-moravia montetaro, ne forgesu viziti la ĉarman vilaĝon kun bela burgo kaj tri novaj Zamenhof/Esperanto-Objektoj!

5. VENU KUNE FESTI 55-JARIĜON DE SOMERA ESPERANTO-TENDARO EN LA GOLFO DE LANĈOV!

9.-11.8. kiel tradicie kunvenos partoprenintoj kaj geamikoj de la tendaro, ĉi-foje eĉ okaze de grava jubileo - datreveno de 55 jaroj - ĉar en jaro 1958 la unuan fojon okazis en Lančov Somera Esperanto-Tendaro sur la nuna loko en Lančov! Sume temas jam pri la 61-a SET, sed la 6 unuaj estis en aliaj lokoj! Ne maltrafu renkonti viajn malnovajn konatulojn aŭ trovi novajn amikojn! Novuloj ankaŭ bonvenas!



Organiza kotizo 50 ĉeĥaj kronoj, 2 tranoktoj en la kabano 250 ĉeĥaj kronoj, tuttaga manĝado por 2 tagoj 245 ĉeĥaj kronoj. Post la 1-a de aŭgusto la organiza kotizo estos 80 ĉeĥaj kronoj. Informiĝu kaj aliĝu ĉe: olgalacinova@seznam.cz

6. VIRTUALA ADRESO @ESPERANTO.CZ

Ni ŝatus vin informi, ke daŭre eblas mendi virtualan adreson en formo "vianomo@esperanto.cz". Se vi havas konton ĉe Seznam.cz aŭ ĉe Centrum.cz, vi povas legi en tiu [ĉi ĉeĥlingva artikolo](#), kiel ĉe tiuj du retadres-servoj agordi ĉion, ke vi povu sendi retmesaĝojn tiel, ke ĝi aspektu en formo "vianomo@esperanto.cz".



7. AKTUALAĴOJ EN WWW.ESPERANTO.CZ

7.1 Artikoloj en esperanto en www.esperanto.cz

Ni invitas vin al regulaj vizitoj al <http://www.esperanto.cz/eo/aktuality> kaj informas vin pri la novaj artikoloj el la lastaj semajnoj:

[Nova ludo ĉe Edukado.net](#)

[Interesaj filmoj: Reta kinejo de UEA](#)

[Novaj esperantlingvaj videoj el Youtube](#)

[Marek Blahuš estas la nova membro de Akademio de Esperanto](#)



7.2 Nur ĉeĥlingvaj artikoloj:

[Esperantské muzeum v pardubickém rozhlasě](#)

(Esperanta muzeo en radio de regiono Pardubice)



[Spravedlivá jazyková komunikace](#)

(Justa lingva komunikado)

8. PLUAJ NOVAĴOJ EN LA MUZEA PAĜO ĈE IPERNITY

Videofilmoj:

[Umberto Eco pri Esperanto](#)

[Edith Piaf - LA VIVO EN ROZ'](#)

[Kastelo Jindřichův Hradec](#)

[El pesimismo al espero](#) - inspira teksto el Brazilo bazita sur sintaksa lingvoludo

Sonregistraĵoj:

[Jan Neruda - Romanco pri Karolo la 4-a](#) - kun fona mezepoka muziko, deklamas Miroslav Smyčka

[Charles Gounod - Serenado de Mefisto el la opero "Faŭsto"](#)

kantas Veselin Damjanov (Bulgario)

9. RADIOPROGRAMOJ EN LA RETEJO DE "ESPERANTA RETRADIO"



Elekto de novaj radioprogramoj en la retejo de "Esperanta Retradio" de Anton Oberndorfer (Aŭstrio) (ĉiusemajne nova diverstema radioartikolo kun akompana teksto!) <http://esperantaretradio.blogspot.co.at>

[La rido kiel filozofia elekto](#)

[Kion deziras la virinoj](#)

[Aventura montgrimpado en Turkujo](#)

[Asocioj perdis signifon](#)

[La hunda lingvo](#)

[Lerni la sonojn de la fremda lingvo](#)

[Kiel komputiloj lernas aŭdadon](#)

Lumigi per gravito

Se vi interesiĝas pri retaj esperantaj radioj, ne forgesu sekvi novajn elsendojn de la Radio Verda Stacio!

10. VIDEOJ NE NUR DE GERMANA ESPERANTA KONGRESO 2013 EN NUREMBERGO

Ni invitas vin spekti kelkajn videojn de la 90-a Germana Esperanto-Kongreso.

[GEK2013#01 Akcepto en la urbodomo](#)

[GEK2013#02 Prelego de Martin Haase Pioniroj kaj vizioj](#)

[GEK2013#03 Prelego de Tonkin](#) - Festprelego de Prof. Dr. Humphrey Tonkin pri "Esperanto, klarvido, kaj la lecionoj de la historio"

[GEK2013#04 Koncerto de Ĵomart kaj Nataŝa](#)

Aliaj videoj

[Mirinda urbo - Rio de Janeiro](#)

vojaĝfilmo da Paŭlo Pavlíček, redaktoro de la "Verda Stacio"

[Yesterday en Esperanto](#) - Kredis mi - John LENNON kaj Paul MCCARTNEY -
- kantas alberta Casey

[Bildkartojn kun surskriboj en ESPERANTO](#) - Kolekcio de Georgi Litov

[125j Esperanto -Hispana Filatelo](#) - Kolekcio de Georgi Litov

[Daŭras La Kant'](#) - originala Esperanto-kanto de Steve Howls

[Aroma Jalto 2013](#)

11. LISTO DE ARANĜOJ

2013-06-08/09: [Muzea Nokto en Svitavy](#) kun inaŭguro de la nova tutjara ekspozicio (ĉi-foje pri arta kreemo de esperantistoj) Info: svitavy@esperanto.cz

2013-06-15: Infana Tago en Svitavy. Informoj: svitavy@esperanto.cz

2013-06-16: [Renkontiĝo sur la pinto de Granda Ĉantorio](#). Turisma renkontiĝo de ĉeĥaj, slovakaj kaj polaj esperantistoj.



2012-06-28/30: Semajnfino en Esperanto-urbo. Busekskurso el Pardubice/Prago al Herzberg am Harz (Germanio). Info: aeH-ikeh@volny.cz

2013-06-30/07-13, 2013-07-14-27, 2012-07-28/-08-09: Tri etapoj de la 61-a Somera Esperanto-Tendaro en Lančov apud Vranov-lago. Info: info@set-lancov.cz, <http://www.set-lancov.cz>

2013-07-12/20: Somera Esperanto-Studado. Aranĝo en Slovakio ideala por komencantoj, kun bunta programo. Nunjare en la urbo Martin. Pli da informoj sur ligilo: <http://ses.ikso.net/>

2013-07-20/27: [La 98-a Universala Kongreso de Esperanto](#). La plej grava Esperanto-aranĝo de la jaro okazos ĉi-foje en la ĉefurbo de Islando.

2013-08-03/10: [KELI-kongreso en Svitavy](#)

2013-08-09/11: [16-a renkonto de ekstendaranoj](#) (de SET)

2013-09-07: Renkontiĝo en Přerov (omaĝe al 90jariĝo de la loka klubo) Info: tonda.krejcir@seznam.cz

2013-09-07: La 7-a Postferia Renkontiĝo (en Vodňany kadre de la Urba solenaĵo) Info: pisek@esperanto.cz

2013-09-20/22: [ARKONES - ARtaj KONfrontoj en ESperanto](#). Tradicie denove en pola urbo Poznano.

2013-09-27/29: [Jubilea solenaĵo en Svitavy](#). Bunta kultura kaj kleriga programo omaĝe al la kvina naskiĝdatreveno de Esperanto-Muzeo kaj 80 jaroj de esperanto en Svitavy.

2013-10-16/20: [La 2-a Internacia Esperanta Lernejo](#). Intensaj Esperanto-kursoj por komencantoj kaj progresintoj (kiel instruanto partoprenos ankaŭ Stano Marček). Okazloko (tranoktado, manĝado kaj instruado): kastelo Bartošovice, 20 km sudokcidente de Ostrava, en la centro de la naturrezervejo Poodří.

2013-10-25/28: [Konferenco de Ĉeĥa Esperanto-Asocio](#). Pinta aranĝo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio kun labora traktado, temaj seminarioj kaj programoj ekskursaj, kultura kaj amuzaj. Okazloko: Nymburk.

2013-11-30: Antaŭkristnaska renkontiĝo en Písek. Informojn sekvu je: <http://www.esperanto.cz/eo/akce/anta-kristnaska-renkonti-o-573.html>.

2013-11-30: [Antaŭkristnaska renkontiĝo en Písek](#).

Ĉu vi ne trovis vian aranĝon ĉi tie? Ne kulpigu nin, sed sendu la informon pri ĝi al retkomunikoj@esperanto.cz. Ne eblas envicigi aranĝon, pri kiu ni ne scias.

ĈEA-RETKOMUNIKOJ 2013/2

Kontakto kun ĉefredaktoro: Miroslav Hruška – miropiro2312@gmail.com

Redakta teamo: Petr Chrdle, Pavla Dvořáková, Marek Blahuš